2.ª JARO N.º 12 DUONMONATA ESPERANTO-GAZETO 15 APRILO 1937

# PoPola Fronto

INFORMA BULTENO INTERNACIA PRI HISPANA LUKTO KONTRAŬ LA FAŜISMO

ELDONO DE GRUPO LABORISTA ESPERANTISTA
REDAKCIO K ADMINISTRACIO: STRATO MAR, NUM. 25 VALENCIA (Hispanio)

## POR UNU EFEKTIVA PACO

Hispanio, sen paradokso, militas por efektiva paco. Tamen pacifismo estas bela teorio suferanta plej strangajn interpretojn; krom mistika doktrino pri absoluta ekstaza kvieteco, eĉ antaŭ krimo de murdisto, ĝi ofte estas nur filistra deziro de propra persona trankvilo. Ĝenerale pacifismo estas kvazaŭ ornama vorto, pri kies virto, proze aŭ verse, oni elspezis abunde salivon k farbon, kio, se taŭga por bombasti voĉon k malpurigi paperon, tute ne utilis por eviti la konfliktojn, kiujn trudas rabeme despotoj k tiranoj per la kruela rajto de la forto kontraŭ la morala forto de la rajto.

Paco ne estas la silento de tombejo; paco estas ja la vigla k normala ordo de homaj vivantoj en libera ĝuado de civitaneco. Ordo estas ekvilibro; kiam, pro kreskanta mizero k lukso insultanta en kontrasto freneza, tiu ekvilibro perdas sian nivelon, tiam detruiĝas la ordo k mankas la paco ĉar la subpremantoj atakas la aspirojn de la subprematoj. Sana korpo estas ankaŭ organika mekanismo en paco, ĉar la normoj de sia movo funkcias regule. Malsano estas atako sur unu aŭ kelkaj organoj; en tiu okazo, la ceteraj sanaj membroj rapide pretiĝas defendi la danĝeran zonon ĉar la sano k la vivo de ili ĉiuj dependas de la sukceso aŭ fiasko de la frata organo en lukto kontraŭ komuna malamiko. Unueco estas natura instinkto!

En nia epoko, la popoloj el diversaj nacioj, por kolektiva asekuro de efektiva paco, devas grupiĝi dense k alkuri defende en la punkton kie la faŝista kancero aperis. Aktiva agado en tiu direkto estas venki la bruliganton de militoj, ataki ŝtorme la atakinton. Jen sola garantio k ŝanco por daŭra vera paco. Ĉio alia, sub ajna masko, estas nur ŝajno de paco, danĝera risko je pereo kiel sekvo de stulta fido aŭ perfida manovro.

Ĉiu, kiu iomete uzas la cerbon por pensi, scias nun ke la hispana popolo, en siaj legitimaj rajtoj, ricevas terurajn ofendojn de la plej karakteriza malamiko internacia de la paco. Kion do fari devas, antaŭ la kruda dilemo de tiu cirkonstanco, la saĝaj pacifistoj? En la komenco povis aspekti simpla k justa, al la prudenta opinio, la freŝa politiko de ne interveno. Tiu taktiko, bona laŭ teorio, estis praktike malutila kuŝinte sur la absurda hipotezo je la deca volo k honoro de aventuristoj ruze grimpintaj en postenon de regnestro.

Skandalo estas la historio de hontigaj epizodoj tra la diplomataj labirintoj; abomena trakto al nobla popolo! Hispanio staris ĉe la bordo de l' abismo tironte, en sia skrapanta falego, la restaĵojn el la demokratio ekzistanta en la mondo. Sen la mirinda rezistado de ĝia stoika popolo, sen la malavara helpo de la aŭtentika opinio universala, sen la digna konduto de Sovetio k Meksikio, plian fojon la forto estus atinginta venkon sur la rajton, antaŭ la hipokrita komplezo de la falsaj pacifistoj aŭ pro la blindeco de naivaj mistikuloj, en pasiva rondo, dum urĝa momento.

Hispanio per sia ofero masonas la fundamenton de universala harmonio. Hispanio ne sentas revojn nek bezonojn pri konkero de imperio. Hispanio nur deziris vivi en paco k mastrumadi sian hejmon laŭ propra kondiĉo, ĝoja psikologio, kiu ignoris rasajn k naciajn diferencojn. La vorto ŝovinismo estis fremda en nia lando. La konservo de Maroko ĉiam estis, anstataŭ emfazo, peza plenumo de jura internacia kompromiso. Sinceraj k lertaj pacifistoj de la mondo! Jen la vera Hispanio, bonanima popolo, kiu antaŭ ses jaroj, en mezo de grandioza paco, ŝanĝis la politikon de sia reĝimo, kun la sola kulpo, pro erara koncepto de amo k fido, permesi ke la armiloj k gvidado de la armeo estus brido ĉe la manoj de perfidaj figuraĉoj en leda kostumo, furiozaj pro la ekvilibro, kiu ŝajnis al ili ĥaoso, de amaso akirinta liberec kleron k progreson.

Hispanio suferas multe pli pro la timo, ke sia torturo estu vana por aliaj popoloj erare edukitaj en la falsa principo ke paco estas pledo anstataŭ himno. Por unu efektiva paco, ekstermu ni kuraĝe la monstron de la militoj.

## PROLETA TOSTO

Grava neŭtrala esperantisto el Lisbono, en semajna gazeto esperantista, post agnosko de la vigla laborista esperantismo en sia lando, pravigas la ŝtatan malpermeson tie de nia movado, k esprimas—iomete emfaze—sian aprobon pri la fakto, ke laboristoj anstataŭ drinki vinon dediĉas tempon por lerni Esperanton.

Ŝajnas mensogo, k tamen estas vero, ke jam en plena 37ª ĉapitro de la 20ª jarcento, ekzistas personoj, kun famo pri klero k saĝo, kiuj kovas en la kapo tiun ĉifonan opinion pri la produktanta klaso dum nia decida tempo. Multaj «neŭtralaj» asoj ne povas—ne volas—akcepti alian bildon pri laborulo ol tiu antikva humila figuro, kun modesta kitelo, luigante sen kondiĉo, eĉ kun hunda dankemo, la forton de siaj muskoloj per ege mizera salajro por trompi la malsaton k eternigi la anemion de sia familio...

Feliĉa epoko, por la kapitalistoj, kiam la proletaro sen la protekto de sindikatoj, sen la instruoj de aŭdacaj partioj, sen la sufiĉa kapablo kompreni la filozofion de sia propra vivo, estis besto facile dresebla, sen postuloj en striko, kun sola plezuro trovi forgeson en la sorĉo de glaso da vino, kies efiko estis triviala ebrieco por gardi decan distancon kun la eleganta fermentado de vaporoj el ĉampano en la mola cerbo de aristokrataj dandoj. Ni penos malkovri do, al grava samlingvano, la novajn sociajn nuancojn en la moroj de niaj tagoj, kiuj glitas kun aŭreolo el faskoj de lumo brilanta.

Ĉiu paĝo de kalendaro, en direkto al morgaŭo, estas ŝanco de nobla metamorfozo por la mizeruloj.

Nun la laboro ne jam estas puno; ĝi estas blazono, honoro k bazo por socia prospero. Laboristoj, respondecaj pri sia tasko, produktas riĉon apud maŝino, studas sciencon en biblioteko, politikon en partio, sociologion en sindikato k facetojn de la vivo en la hejmo, en la strato aŭ en la fina etapo de angora batalo, kiel nun en Hispanio, inter sana impulso, kun celo altigi la dignon de l'homo, k forto kaduka kun ebla intenco kondamni parton de la socio kapti emociojn, ne en la fluoj de la vivo ĉarma k ĝentila, sed en la amara feĉo de ajna malkara trinkaĵo.

Ne, tute ne! samligvana moŝto el najbara lando, kies reganta satrapo estas malamiko nia: Nuntempe, preskaŭ ĉiuj laboristoj, kiuj ne dorlotas la sintakson de nia lingva frandaĵo ne perdas ankaŭ tempon k sanon per vino aŭ diboĉo. Ili ĉiuj, laboristoj de amboso, intelekto k arto, laŭ emo, devo k plaĉo, hardas siajn kapablojn por savi la trezorojn de la civilizo en la fronto de la kulturo, mortante ankaŭ, se necese, por defendi tion en la fronto de la antifaŝismo.

Drinki ebrie jam ne plu estas laborista signo. Tamen, la nova popolo levas alten, al lazuro, la arĝentan pokalon de sia tintanta fantazio, en la solena tosto por vivo feliĉa, gaja socio, sen alia ebrio krom tiu de la amo en turnoj de kisa ŝmaco.

# La botisto Grego Salvatore

La ŝuisto Grego Salvatore naskiĝis en Palermo. Ekde kiam lia aĝo atingis sian dekan jaron li najlis plandojn k per ruĝeta ledo flikis ŝuojn de laboristoj.

Li nun estas jam 24-jara kun tre sunrostita vizaĝo, regulaj trajtoj, ardaj okuloj por flama rigardo.

La faŝistoj donis al li membrokarton de la partio, sed li ne scias pri tio, kion oni presis sur la kartono ĉar la faŝistoj ne instruis lin legi.

Li militservis en 52a bataliono de itala armeo. Tiu bataliono estas nomata «Bataliono Garibaldi».

La nigraĉemizuloj ĵetas la soldatojn kontraŭ la popolo k samtempe ili ripetas la nomon de l' heroo de la libera Italio: «Giuseppe Garibaldi».

Al soldato Grego Salvatore ili diris: «La faŝismo donis potencon al Italio!»

Kaj la soldato parade rektiĝis.

Kiu scias pri kio li pensis. Ĉu li pensis ke sia patrino mortis pro malsato? Ĉu pri tio ke li havas, en Palermo, unu fraton k ses fratinojn, kiuj petas nutraĵojn?

Eble li memoris pri vortoj de ŝuisto Beppe.

La maljunulo Beppe instruis al Grego najli plandojn k, haltigante la martelon, ofte li diris al Grego: «Ĉiuj naskiĝas nude, la ŝuistoj k la markizoj; Kial Mussolini murdas komunistojn? ĉar riĉuloj deziras mangi abunde k dormi komforte...

Tio okazis antaŭ dek kvar jaroj.

...En la stratoj, aŭdaculoj ankoraŭ parolis pri la nigra teroro. Poste, tiuj aŭdaculoj estis ekzilitaj al insuloj Lipari. Ĉio restis trankvila.

Sed ŝuisto Grego ne forgesis la instruojn de maljunulo Beppe.

Kune kun aliaj italoj, Grego Salvatore estis sendita al Hispanio por submeti hispanan popolon.

En la bataloj de Guadalajara luktis, en respublikaj vicoj, bataliono de italaj volontuloj kiu defendas liberon de frata popolo. Tiu bataliono ankaŭ estas nomata «Giuseppe Garibaldi».

La ŝuisto Grego Salvatore, deĵorante en iu faŝista divizio, aŭdis sian propran lingvon.

Li komprenis, ke li havas antaŭ si la amikojn de Beppe, kiu mortis antaŭ multe da tempo. Ĵetante teren la fusilon li diris:

«Mi volas albatali faŝistojn. Ili murdis mian patrinon. Ili murdis mian patron. Ili sendis min fari krimon favore al markizoj k kontraŭ miaj kamaradoj! Mi petas envicigon en bataliono «Garibaldi». Mi ne scias legi, sed Beppe rakontis al mi la historion de Garibaldi. Ho, se Garibaldi estus vivanta neniam regus faŝistoj en Italio!»

Romaj piratoj eraris. Ili formis diviziojn per grupigo de senlaboruloj, humiluloj k ĉifonuloj; kun ĉiuj, kiuj pretiĝis iri ĝis Abisenio por konstrui ŝoseojn, kulturi teron aŭ transporti ŝtonojn. Trompante milojn k milojn da proletoj, kiuj malamas faŝismon.

Tamen ekde hodiaŭ la respublika armeo riĉiĝis per nova volontulo.

Malgraŭ la decidoj de Londona Komitato, tiu volontulo estis sendita al Hispanio pere de itala registaro mem.

Tri torpedŝipoj eskortis la ŝipon, kiu transportis al Hispanio la novan respublikan volontulon, soldato de faŝista armeo, Grego Salvatore.

Post la ŝuisto sekvos aliaj: vinistoj, paŝtistoj ŝtonistoj...

Italio ne estas generalo Bergonzoli, ĝi estas la ŝuisto Grego Salvatore ĉar oni povas kripligi popolon sed oni ne povas mortigi ĝian animon.

Ilya EHRENBURG

Jen karakteriza bildo de la vera virino hispana. Ŝi ja ne estas tiu ekzotika figuro, kun kastanjeto k mantilo, kiun oni prezentas ŝablone k false, en oficejoj de turismo, kiel originalan tipon de hispanino. Ŝi estas nur bona kamparanino fuĝinta el la faŝista teroro de Malago. La suno brileganta k la kruda laboro mordis senkompate la mildajn trajtojn de tiu virino, kiu malgraŭ mizero k malsato, en serena patrineca pozo, estas ankoraŭ tragike bela sub la hela arko de sia kaptuko. Emblemo ŝi estas de ĉiuj popolaj virinoj: patrino, edzino, fratino aŭ ĉasta fianĉino de tiuj miloj k miloj da «ruĝuloj» kiuj luktas anonime, kontraŭ la faŝista vampirismo, por atingi almenaŭ la mirindan celon ke iu luma strio de plaĉa rideto estu arnamo natura por la vizaĝo pura de tiu hispanino, dum suĉas frandeme la bubo...



## Al fronto de popoloj

Mond' laborista aŭdu min!
Hispanaj fratoj vokas vin!
Ilin helpu vi tre kore
Ilin helpu ĝis la fin'!
Ilia venko, nia glor'!
Ilia perdo, nia plor'!
Ilin helpu vi tre kore
Ilin helpu ĝis la fin'!
Ilia krio nin vokas
Kaj la sento reciprokas!
Ilin helpu vi tre kore
Ilin helpu ĝis la fin'!
Ilia helpo, nia dev'!
Ilia venko, nia rev'!
Ilin helpu vi tre kore
Ilin helpu ĝis la venk'!

Verkis juna araba esperantisto laboristo el Betlehemo (Palestino)

**Esperanto, en nia tre grandioza lukto, estas kampo kaj plugilo**

## SAGETOJ SEN MALICO

● Dekomence venis la marokanoj, kiuj dediĉis sin al forrabo k perforto tra la vilaĝoj, en kiuj ili eniris.

La plejmulto el ili jam putras subtere.

Post ili, alvenis la «blondaj maŭroj» de Hitler. Ĉi tiuj disciplinc bataladis k zorge plenumis sian devon: malvenki k morti amase!

Lastatempe la vasaloj de Mussolini partoprenas la gloran taskon. Ŝargite per tunoj da heroeca literaturo, ili superas ĉiujn siajn antaŭulojn, ĉar... ili forkuras kiel cervoj, forlasante ma'avare sian abundan unuaklasan materialon. Krom tio, ili sin liveras kaptite, tute ĝentile k senĝene.

Ni do, preferas la italajn trupojn!

● Malgraŭ la abunda dokumentaro trovita ĉe la italaj kapitoj en la nordo de Guadalajara provinco, ĝis nun (almenaŭ kiam ni skribas ĉi tion) ankoraŭ ne la Ligo de Nacioj nek la Londona Komitato akuzis Italion, kiel atencinton.

Imagu, ke iu submareno aŭ alia militŝipo de la hispana Registaro dronigus italan militŝipon surportantan soldatojn al Hispanio. Ĉu, tiam oni nomus Hispanion, atakintan ŝtaton? La nuna paradoksa diplomatio praviĝas tiun konjekton nian!

● Generalo Miaja deklaris: «Eŭropo vidas, ke la fantomo pri la potenco de la Suficas kontraŭstaro de embria germana k itala armeoj, elvaporiĝas en niaj manoj. popola armeo por elpruvi, ke ne estas same paradi aroge k aŭskulti blufajn paroladojn de diktatoro, grimpinta sur kanono, ol batali virece.»

Konsekvence de la «triumfa» marŝo malantaŭen de la italaj legioj, oni jus fortikigis ilin per aldono de germanaj soldatoj, freŝaj maŭroj k civilgvardiatoj hispanaj.

La fiasko kuniĝas ĉiujn en komuna malfeliĉa disreviĝo...

● Hitler k Mussolini ĝis nun sukcesis prezenti la partoprenon de siaj korpusoj en nia milito, kiel liberan agadon de decidemaj volontuloj.

La eksterlandaj volontuloj alvenintaj en niajn vicojn, travivis gravajn malfaciaĵojn ĝis ili atingis la lojalan teritorion en Hispanio. Dume, la faŝistaj volontuloj veturis rekte helpataj de siaj registaroj, bone ekipitaj, sur speciale frajtitaj ŝipoj kun armilaro k municio... Sed oni ankoraŭ parolas pri volontuloj en ambaŭ flankoj!

Tio signifas, ke en la putranta Komitato pri Ne-Interveno estas akceptita la principo, ke LA ŜTATOJ, OFICIALE, ANKAŬ RAJTAS ALMILITI, KIEL VOLONTULOJ.

Kia haladzo!!

## Responde al "Oportuna konstatigo"

Ni bedaŭras, ke la redakcio de POPOLA FRONTO trovis oportuna la momenton por polemiki en publika tribuno kontraŭ la gvidantoj de organizo, kies membroj ili estas, k ni ne komprenas kiun celon povas havi tiu kritiko. Urĝas al ni tamen, helpi al la trankviligo de l' konscienco de la PF-redaktoroj per simpla deklaro, kiu ŝajne malnecesigas longan eksplikadon: Ni, estraranoj de SAT, same arde kiel iu ajn el la simplaj membroj de nia organizo deziras la venkon de la laborista klaso en la hispana batalego. Eĉ se temus nur pri la bonfarto de nia Asocio, ni ne povus deziri ion alian, ĉar venko de faŝista diktatoreco signifus malpermeson de la esp. movado k, tute speciale, la detruon de l' Lab. esperantismo en Hispanio.

Se tio ĉi ne esprimiĝas tiel flamavorte en niaj gazetoj, kiel atendas la valencianoj, pri tio ne devus kulpigi nin niaj sudatemperamentaj k-doj: ja la plimulto el nia membraro loĝas pli proksime al la «glacia zono», k ilia temperamento estas konforme kvieta, kio tute ne signifas, ke mankas al ili profunda sento de simpatio k solidaro por la iberia batalo.

La k-doj devus ankaŭ provi kompreni, ke «P. F.» k SAT-organoj havas malsamajn taskojn: la unua estas «agiteca» gazeto, la duaj estas «informaj k edukaj.» Laŭ ni, ambaŭ havas sian ekzistorajton, k certe la red. de «P. F.» ne volus postuli, ke SAT rezignu je sia, de 17 jaroj entreprenita, specife kultura laboro, konforma al la lab.-esperantisma idealo, por transformiĝi en agit-aparaton. Tio estus tute kontraŭa al ĝia celo k ekzistokialo. Ni ĉiam k ĉiam insistis pri tio, ke SAT ne devas konkurenci al la laboristaj batalorganizoj (partioj, sindikatoj), transprenante ties taskojn. Ni esperas, ke niaj valenciaj amikoj komprenos tion k juĝos estonte pli senpasiece pri nia agado, malgraŭ la incita atmosfero, en kiu ili nun vivas.

Plenumkomitato de SAT.

NOTO DE LA REDAKCIO. —Kun plezuro ni publikigas la respondon de SAT. al nia, eble «hereza», artikolo. Ni deziras nur aldoni broĉe kelkajn vortojn.

Ni tute ne kuraĝas taksi ĉies ardecon, pri kiu ni cetere ne dubas. Ankaŭ ne temas nia aludo, pri «temperamento» sed pri konduto, rilate al kio ni esprimis k esprimas nian bedaŭron pro la manko de ĝustatempa, se ne «agiteca» almenaŭ «informa k eduka», oficiala deklaro de la estraro de SAT pri la hispana afero. La movon oni pruvas per movo!

Fine, ni ankaŭ bedaŭras, ke nia atmosfero, rilate al lukto kontraŭ la faŝismo, ne estas ankoraŭ ĉies atmosfero... malgraŭ ke la bruna danĝero minacas eĉ tiujn, kiuj sin kredas en «glacia zono».

## La moveblaj dratoj

En la fronto de Oviedo okazis antaŭ kelkaj tagoj ŝerca epizodeto, kiun letere rakontas amiko: En sektoro de tiu fronto, la faŝistoj starigis dratojn antaŭ siaj parapetoj por eviti subitajn atakojn de la milicanoj. Dum kelkaj noktoj, la popolaj armeanoj rampis ĝis tie k silente forportis la pikildratojn. Ĉiutage la faŝistoj devis refari la laboron sub la fajro de niaj armiloj. Lastanokte niaj soldatoj iris ĝis la drataj bariloj k nodis ŝnureton sur la ĉefaj aksoj.

Ĉe la tagiĝo, la faŝistoj ĝoje rigardis la dratojn en ĝia loko k pro tio komencis rikane mokadi. Subite la dorna metalfadenaro, antaŭ granda miro en la faŝistaj tranĉeoj, vigle marŝis ĝis la limo mem de niaj ŝirmejoj. La fino estis furioza pafado de la malamiko kun taŭga simila respondo niaflanke. La milicanoj nun rikanis pli volonte ĉar ili efektivigis proverbon, kiu avertas saĝe ke pli trafe ridos, kiu laste ridos...




Klara emblemo de la ribelintaj militistoj, estas la groteska figuro de generalo Queipo de Llano, estro de la «nacia» armeo en Andaluzio. La radiostacio de Seviljo disaŭdigas ĉiunokte lian ebrian voĉon, anoncante ĉiam, en mezo de aĉaj ŝercoj k vinaj vaporoj, krimojn k minacojn kontraŭ la popolo. Ni prezentas popularan karikaturon de tiu raŭka fripono, kiu prave meritas la tragikan epiteton je «klaŭno de la morto»

# Internacia migrado de antifaŝista pastro

**Klera pastro Leokado Lobo, paroĥestro en grava kvartalo de Madrido, jus trakuris kelkajn eŭropajn landojn por laŭtigi verve, per emocia voĉo, la konvinkon de sia katolika aŭtoritato pri la absoluta rajto k sankta devo de la hispana popolo defendi materiajn k spiritajn valorojn kontraŭ la atakoj de la internacia faŝismo, kiu, uzante blasfeme patosaĵa vortojn pri intimaj sentoj, estas ja tamen la plej vera malamiko de ĉiu nobla emocio.**

**Tiu honesta pastro, pro tio mem, devis sperti eksterlande ĝenojn k malhelpojn. Li rakontis, tuj post sia reveno, impresojn k travivaĵojn el kiuj ni eltiras ekstrakte la plej interesajn fragmentojn. Ĉio estos utila materialo por honestaj religianoj.**

Post longa vojaĝo tra Eŭropo, mi jam paŝas denove sur hispana tero. Mi trafis ĝenojn k eĉ spertis la honoron kaŭri en karcero, pro la kulpo fervora defendi eksterlande la veron pri Hispanio; radianta vero, kiun la tuta mondo ankoraŭ ne plensence komprenas.

Jen do mia ĉiama prediko: Nia terura milito ne estas afero pri religio ĉar pendigi ekleziajn medalionojn sur mahometanaj brustoj; faskigi en sama fronto arabojn, germanojn k italojn por sklavigi popolon; murdi senkulpulojn k mensogi blufe pri civilizo aŭ katolikismo estas abomena atenco kontraŭ la vera religia spirito.

Mi ne perdis mian fidon je Dio! laŭte mi proklamis tion publike antaŭ la mondo; malgraŭ mia pastreco, homoj el malsamaj tendencoj, en vastaj aŭdantaroj, aŭskultis atente k respekte miajn vortojn en arda defendo de la legitima registaro. Milda ĝuo estas scii, ke la alta nombro da katolikoj, kun pastroj, luktantaj apud la popolo, plenumis gravan rolon je la servo de la libero por detrui la legendon pri persekuto al la religio. La faŝistoj malamas tiujn katolikojn plej freneze, ĉar ili mem estas precize kiuj, per sia ekzemplo, subfosas unu el la gravaj fundamentoj de la fia faŝista propagando.

Unuan fojon mi parolis en la Hispania Hejmo de Bruselo; kelkaj provokistoj intencis fuŝi la entuziasmon; stangoj de kurtenoj donis pune rapidan respondon; en mezo de aplaŭdoj, inter ploro k rido, mi travivis neforgeseblajn momentojn. Ĉe la fino venis al mi katolika familio kun jena alparolo: «Patro, ĝis hodiaŭ, ni preĝis hejme por Franko, de nun ni faros tion por la venko de via bona popolo!»

Ankaŭ en Belgio, okazis emocia k reliefa epizodo: dum amasa publika kunveno, iu laboristo demetis sian surtuton k donis ĝin al dejorantaj virinoj: «Mi ne havas monon—li diris—pro tio mi donas nur kion mi posedas.» Sinjoro, kun burĝa aspekto, aŭdis la frazon k venis al mi dirante: «Mi ĵus ricevis fortan emocion, se proleto donis sian surtuton prenu do vi ankaŭ mian donacon.» Mi malfaldis papereton, kiun li donis: ĝi estis ĉeko je valoro de cent mil frankoj!

La faŝista gazetaro postulis kriaĉe mian forpelon. La civilaj k ekleziaj aŭtoritatoj eksentis timon k *tre afable* transportis min ĝis la nacia limo. Sufero k ĝojo alternis poste, en Amsterdamo mi ĉeestis kunvenon de ĵurnalistoj, ankaŭ mi celis iri al Anglio, sed antaŭ la elŝipiĝo oni ne permesis eniri en Londono kie mi devis oratori en mitingo aranĝita de la angla Ruĝa Kruco; cirkulis la sciigo pri mia arestiĝo k la ĉeestantaro ovacie esprimis sian simpation al mia persono per efika fordono de kelkaj miloj da funtoj sterlingaj. En demokrata lando, estis pli trafa mia enkarceriĝo ol mia parolo!

Jam revene en Parizo mi perceptis la fluojn de solidareco al Hispanio en intelektulaj k proletaj medioj. Estas treege kortuŝa la sindonemo de miloj k miloj da malriĉuloj, kiuj ĉiusemajne vundas sian mizeran buĝeton per novaj oferoj de mono. En kongreso de senlaboruloj, mi parolis kiel hispana pastro liginta sian vivon al la sorto de la popolo; ĉe la fino de mia interveno, ĉiuj, kun pugno fermita, postulis favoran trakton k taŭgajn defendilojn por Hispanio; mi ankaŭ levis la pugnon k, en solena silento, mi povis ekbalbuti: «Mi ne estas komunisto nek anarkisto, mi estas nur simpla katolika pastro, tamen mi ankaŭ levas la pugnon ĉar tio estas nun komuna saluto antifaŝista.»

Spirita akompano, por granda kvanto da mono, estis brakpreno da floroj k multaj salutleteroj por la heroaj defendantoj de Madrido. En la ĉarma Nederlando mi restis kelkajn semajnojn, laŭ afabla invito de Selma Meyer k grava rondo de talentaj doktoroj. Ankaŭ aperis tie, paralele kun la popola simpatio, la oficiala malhelpado. Iun nokton, la polico arestis min k, post kelkhora restado en karcero, oni petis min pri diligenta forigo de tia tre gastama lando.

Kaj nun jam en Hispanio, kion mi pensas fari? Ĉion! laŭ volo aŭ deziro de la popolaj instancoj, mi verkos aŭ parolos, mi zorgos verŝi ŝmire konsolon sur tioma doloro k larmado. Mi flegos malsanulojn k vunditojn, aŭ mi kuŝos en angulo, se por nenio mi taŭgas. Preta denove trakuri landojn pilgrime, kiel antifaŝista kristano, por atentigi miajn samreligiajn fratojn pri la simbolo de nia lukto, kies celo, krom defendo en perfida atako, estas efektivigi sur tero la sencon de la belaj vortoj de Kristo, forgesitaj de la kapitalismo: amu unu la alian!

## La 1ª de Majo estu esprimo de konscio por la hispana popolo!

**Nunjare, la universala dato de la proletaro havas reliefe specialan signifon pro la decida batalo de nia popolo, kiu obstine renversas, unuan fojon, la ofendeman fieron de la faŝismo internacia. En ĉiu urbo tra la mondo, kie la amaso povas kunveni manifestacie dum la tago solena, kiun la klaso laborista elektis por publika elmontro de forto k potenco, unu sola volo devas esti premo, en aroga postulo, por efika helpo al la brava Hispanio, punkto konkreta k celo brulanta de la aktuala 1ª de Majo!**



Tuie nekonata portreto de Zamenhof, farita en Valencio mem en la jaro 1909. Okaze de la vizito, kiun li faris al nia urbo post la 5.ª Universala Kongreso en Barcelono

La apero de ĉi tiu numero de POPOLA FRONTO preskaŭ koincidas kun la 20ª datreveno de la morto de nia kara D-ro Zamenhof; tial ni kredas oportune montri nian estimon k respekton, por la genia kreinto de Esperanto, prezentante omaĝe la sociajn trajtojn de lia simpatia persono, en rilato al nia specifa rolo. Zamenhof, modesta kuracisto, laŭ socia deveno estis mezklasano; esplorante tra fizikaj doloroj li volis ankaŭ kuraci moralajn suferojn; serĉante solvon en tiu direkto, kun orientana pacienco, li polure prilaboris la fundamenton de nia lingvo. Li serĉis unuecon por amo k paco per interkompreno, kun interna ideo pri homaranismo. Kvankam, pri ĝenerala politiko, li ĉiam prezentis sin kiel neŭtrala homo, li volis progreson k liberon por ĉiuj homoj feliĉe komprenante unu la alian... Ni rajtas do sekve aserti, sen ofendo por lia rememoro, ke li estis liberala k antaŭenema civitano.

Krom tio li estis judo; jen grava faktoro por nuna tempo de abomena propagando pri rasa malamo, kiel plej «scienca» teorio de la faŝismo, en la celo eviti ke la popoloj interkonsente povu dissalti la obstinajn barojn por atingi en fervoro la celon de vivo feliĉa.

Lazaro Ludoviko Zamenhof, idealista persono, liberala etburĝo, saĝa intelektulo k sincera amiko de la proletaro, meritas hodiaŭ, pli ol ĉiam, esti nia vera majstro, kiel alta simbolo por la antifaŝista esperantismo ĉar Zamenhof nun certe ne estus adepto de la faŝismo sed nur eble ja ĝia viktimo! Kulturo sen dorno de privilegio estas herezo...

Post 20 jaroj de lia morto, Esperanto, lia mirinda verko taŭgas efike por defendi praktike la rajtojn de la popolo de Hispanio. Jen bela girlando de gloro tre digna k pura!

# TRA PRIVATA KORESPONDADO

Malnova korespondanto el eksterlando ĵus sendis al iu redaktoro de nia gazeto jenan leteron:

«Kara amiko! Pere de la hispana gazetaro, kiun vi sendas, mi sciiĝas pri kelkaj diroj, rilate al via batalo, kiujn mi ne povas lasi sen komentario. Vi ĉiuj k la gazetoj parolas tro multe pri la patrio, kio vere ŝokas min ĉar ni devas konsideri, ke la laboristaro ne havas patrion. Tiu ideo pri la hejma lando estas granda mensogo per kiu la burĝaro ĉiam intencis trompi la ekspluatatan klason k ĝin devigi al tio, kio estas konvena nur al ekspluatanta klaso. Per tiuj frazoj: «sendependeco de la patrio», «defendo de popolamasoj kontraŭ la malamiko» la reganta klaso defendas siajn proprajn interesojn pere de la malriĉuloj k mizeruloj.

Kaj pri tio mi devas diri, ke mi ne povas interkonsenti kun vi. Kiel ĉiam diris la gvidantoj de la Socialismo, ni ne havas patrion; tial ni ne povas defendi la patrion de kapitalistoj. Ne parolu do pri defendo de la patrio k samtempe pri socialista revolucio ĉar tio ja estas kontraŭdiro.»

Nia kamarado respondis jene:

«Kara amiko! Kun plej granda plezuro mi respondas vian leteron. Neniam mi komprenis la senton de patrio. La nacia flago ankaŭ neniam lasis en mi alian impreson krom indiferento. La parado de militistaj trupoj ĉiam naŭzis min. Neniam mi komprenis aplaŭdon k ĝojon de la rigardantoj antaŭ marŝado de soldatoj. Same kiel vi, mi ankaŭ kredis, ke la laboristaro ne havas patrion en kapitalista reĝimo. Atentu la detalon!

Sed nun, en Hispanio, la afero estas alia. La posedanta klaso fiaskis k detruis normojn pro sia abomena perfido. Ĝi devis malvolonte lasi al laboristoj preni la bridojn de regado. La laboristaro nun posedas la fabrikojn k la kamparanaro la teron. Ni povas diri, ke la laboristaro ĉi tiea jam havas k luktas por plene posedi grundon de propra patrio, flago, himno k popola armeo. Tio estas ĉio.


Nun la laboristaro defendas la hejman landon ĉar ĝi jam havas reālan domon sur materia tereno, kiun laboristoj neniam havis. Kompreneble, la laboristoj havas la devon defendi tion, kio apartenas al ili, kontraŭ atako de Hitlerio k Musolinio, kiuj helpas la «naciistan» Frankion. Franko ne defendas la patrion, kiel li fanfarone reklamas en reakcia gazetaro tutmonda, sed siajn privilegiojn k celas rekapti la riĉaĵojn k teron, kiuj ne apartenas al li; vere tio nur apartenas al laborista popolo de Hispanio. Defendu, do, la hispanoj hispanan teron ĉar ĝi jam apartenas al ili. La laboristoj nun jam havas patrion; ili devas defendi la zonon kiun ili regas, konkeri la faŝistan zonon k poste, kiam la tuta lando estos sub nia plena regado, tiam oni zorgos kun entuziasmo pri socialista konstruado sur firma k propra kampo, akirita per sango, k certe ne sur nuboj.

Kiam la ĉiulandaj proletoj faros la samon, kiel jam faris niaj sovetaj kamaradoj k kiel nun ni faras, tiam ne plu jam ekzistos «patrioj» sed nur mirinda Federacio laŭ unu sola k granda tutmonda proleta Patrio.»

# Nia dua venko sur ebena kampo

La batalo de Arganda estis la unua venko sur ebena kampo, en la milito por nia sendependo, kontraŭ la invada faŝismo. La batalo de Brihuega, ĉe Guadalajara fronto, estis la dua venko. La unuan ni atingis super armeo germana; la duan ni gajnis kontraŭ italaj divizioj.

La mirinda rezistado de Madrido restos en la monda historio kiel grava okazintaĵo sen precedenco. Ĉiuj nacioj havas urbojn, kiuj heroe rezistis aŭ pereis, sed neniam okazis, ke granda ĉefurbo, staranta sur glataĵo, apud longa montaro, sen naturaj defendolinioj, kiu unue



Jen portreto de generalo Miaja kara simbolo por la heroa defendo de Madrido

frakasis sian perfidan garnizonon k poste detenas en la montaro aliajn garnizonojn, fine rezistas fortegajn atakojn de ŝturmaj trupoj k motorigitaj divizioj, venkas ilin k konservas libere siajn komunikojn kun la ekstero.

Por atingi tiun lastan rezulton, Madrido estis devigata subteni du fortajn batalojn. En Arganda, germana armeo; en Brihuega, itala armeo. Du malsamaj taktikoj, du rasoj, du kolektivaj psikologioj; k la sama rezulto, la malamiko estis venkita.

Tuj post la fiasko de la unua atako al Madrido, la faŝistoj komencis ellabori planojn por kapti la urbon. Ankaŭ sinsekve fiaskis tiuj planoj; unue, la kojna atako, kiun planis Yagüe, en sektoro Las Rozas; due la amasa atako planita de *Von* Faupel en sektoro Arganda, k poste...

La italoj, enirintaj en Hispanion tra haveno Kadiz, per eksterordinara kvanto da soldatoj k maŝinoj, konkeris urbon Malago, tre facile k neatendite. Tio pliigis ilian faŝisman emfazon; ilia aroga k fanfarona literaturo tuj trumpetis proksimajn venkojn. Tion, kion ne povis hispanoj k germanoj, ili plenumos en Guadalajara.

Necesis fari rapidegan militon, impresi la malamikon per fortaj skuoj. Anstataŭ densaj kolonoj, disaj atakoj. Ne kojnaj atakoj sed envolvigaj manovroj. Pli da materialo ol da soldatoj. Ampleksaj frontoj. Rapidaj flankaj movoj. Ili kalkulis sur du motorigitaj divizioj, sur alia duonmotorigita, sur maŭra kavalerio, sur potenca aviadilaro k regimentoj de tankoj.

La hispanaj milicanoj kovris tro ampleksan zonon, troan kvanton da vilaĝoj. Facile povos la italoj rompi tiajn hispanajn defendoliniojn. Facile ili konkeros la tutan plataĵon; la unuan tagon, Brihuega; la duan, Guadalajara, k la trian, Alkala. Madrido tuj restus tute izolita.

Por efektivigi la revon ili organizis tri kolonojn; unu kiu manovrus en la mezo, tra ĝenerala vojo, alia por manovri ĉe maldekstra flanko, k tria kolono, kun delikata misio malsupreniri tra vilaĝoj Cogolludo k Torrelaguna por tranĉi la komunikon kun la montara fronto.

La ĉielo aperis kovrita per aviadiloj. La tero per artileriaj baterioj, aŭtomobiloj, mitraliloj, tankoj...

Tutsame ol kiam Badoglio atakis en Abisenio la malbone organizitajn armeojn de Seyun, Kassa k Desta...

Sed en provinco Guadalajara ne estis abisenoj, sed hispanoj, kiuj havis modernajn k efikajn armilojn. Kaj en aero ne flugis nur la Caproni k Fiat; baldaŭ flugis niaj impetaj ĉasaeroplanoj k aŭdacaj bombardaviadiloj.

Ni gajnis, unue, la aeran batalon: nia aviadilaro mirinde venkis la faŝistan, konkerante definitive la ĉielon. La italaj motorigitaj kolonoj estis bombardataj k mitralataj; ili perdis la iniciativon. Ilia plano ne povis esti efektivigata kaj ili projektis. Ni cedis Brihuega nur post tri tagoj. La hispana linio cedis sen rompo, malrapide k pro zorga taktiko.


Ni cedis ĝis Torija, kie la italoj koncentriĝis k kun optimismo preparis decidigan atakon al urbo Guadalajara. Sed tiam aperis nia kontraŭatako.

Kontraŭatako estas definitiva formo de rezistado, kiam la rezistado anstataŭas kvietecon per dinamiko. Tiu movo surprizas k devigas malantaŭeniri.

Nia atako estis tiom forta, ke italaj divizioj dise forkuris; ni kaptis grandegan, eksterordinaran kvanton da soldatoj, armiloj, municio...

Centoj da kaptitoj, centoj da volontaj forkurintoj, centoj da veturiloj, kanonoj, mitraliloj... Bona rikolto, kiu parolas al ni elokvente pri gravega senmoraliĝo. Preskaŭ nevole ni memoris pri Caporetto...

Generaloj Franko k Mola anoncis, ke la malbona vetero devigis lin haltigi la ofensivon. Sed ili neniel par-



LA «INTERNACIO» EN NIGRA ĈEMIZO
Por finfina forkuro, ni grupiĝu en rond'!

toprenis tiun militan agon; Bergonzoli, Nuvoloni, Coppi k Manzini estis la italaj generaloj, kiuj komandis tiujn italajn trupojn.

Tie ne luktis hispanoj; krom la italoj nur estis germana grupo kun kelkaj maŭraj eskadronoj. Sed la malvenkon spertis itala armeo ĝis tia grado, ke ĝi devigis Mussolini al subita reveno el Libia. Romo, Berlino, Lisbono ne plu povis nei tiel evidentan veron.

# MOZAIKO

● La hinda poeto Rabindranath Tagore, delikata menso lumiganta la mondon per plej altvaloraj moralaj pensoj, prononcis profundajn sincerajn, vortojn rilate al hispana popola lukto.

Ili estas kvazaŭ tremoj de koro funkcianta kun ritmo de bono k justo. Varme li kantis al Madrido, al tiu urbo, kiu entenis tiom da ĉefverkoj, elokvente parolantaj pri ĝia arto k kulturo, k kiuj malaperis pro terura milito.

Li aldonis: "Kiuj sin nomas civilizitaj, bombardis hospitalojn, murdis milojn da malfeliĉaj virinoj k senkulpaj infanoj..."

Li petas la starigon de digo kapabla deteni la marŝon de ondo sovaĝa k barbara, kiu minacas okcidentan civilizon.

Tiel parolas la dolĉa poeto de Hindio, je la nomo de orienta kulturo, kontraŭ la besta faŝismo atakanta la registaron, kiun propravole donis al si la hispana popolo.

● Generalo Miaja solene liveris al hospitalo de l'Nacia Arta Trezoro, la kvin valorajn dokumentojn, kiujn oni trovis en poŝoj de italaj kaptitoj en Guadalajara.

Temas pri tre gravaj dokumentoj, de 12ª, 16ª k 18ª jarcentoj, ŝtelitaj de la italoj el Arkivo de katedralo en Sigüenza.

● En itala urbo Modena estas arestitaj kelkaj oficiroj, kiujn oni kulpas pri dissendado de hispanaj sciigoj, per privata radiostacio.

La arestitoj estas generalo komandanto de milita Akademio, alia generalo, kiu mortis poste en la karcero, kolonelo k pli ol kvindek oficiroj. Krom ili estas arestitaj kvin advokatoj, horloĝisto, kiu posedis la radioaparaton k aliaj civiluloj.

Itala registaro tuj ordonis la eliron el tiu urbo de la 6ª artileria regimento k la 36.ª infanteria regimento.

● Laŭ faŝista gazeto el Belgio: Mussolini kompense de helpo de itala armeo al generalo Franko, postulis la restarigon de la monarkio favore al princo de itala dinastio. La kandidato estas la duko de Aosta, ido k heredanto de Amadeo de Saboya, kiu estis elektita kiel reĝo de Hispanio la jaron 1870 k tre volonte forlasis la landon post tri jaroj de peza regado.

● Laŭ rektaj sciigoj, dum kvar sinsekvaj tagoj, alvenis en Zaragozo kvar dek ok vagonaroj, kiuj transportis vunditojn el Guadalajara fronto.

Tiuj vagonaroj eniris en la urbon dum la nokto. La italaj vunditoj estis transportataj al hospitaloj antaŭe malplenigitaj.

● Denove baskaj pastroj estas murditaj. Alejandro Mendicute, 45 jaraĝa, pastro de Hernani, estis arestita, poste liberigita k fine arestita en karcero de Ondarreta, el kie li estis eligita nokte...

Martín Lecuona, 29 jaraĝa k Gervasio de Arlizu, 64 aĝa, estis enkarcerigitaj en Ondarreta; post kelkaj tagoj ili estis kondukitaj al vilaĝo kie oni fusilmortigis ilin.

Joaquín Arin, Jose Markiegui k Leonardo de Guvidi estis kondukitaj al karcero k poste fusilmortigitaj apud muro de tombejo en Hernani.

● La malgranda haveno, en Orienta Prusio (Germanio), proksima al Koenigsberg estas nun grava centro de eksportado el kie eliras ofte grandaj komercŝipoj ŝarĝitaj kun direkto al faŝista zono de nia lando.

Germanio ankaŭ plenumas korekte la decidojn pri la ne interveno.

● La fama kolonelo franca Raynau heroa defendinto de Vaux, sendis al generalo Miaja k al hispanaj soldatoj, kiuj defendas Madridon, varmegan gratulon pro la kuraĝo de hispana popolo. Li deziras tujan k plenan venkon al nia armeo.

● Dum kelkaj tagoj, en itala urbo Genovo k en kinejo Orfeo estis montrata filmo, marko "Luce", pri la konkero de urbo Malago.

Sur la ekrano aperis italaj soldatoj, italaj armiloj, italaj flagoj k afiŝoj kun vortoj: "Reĝa Armeo" k. t. p.

Ĉe la fino aperas scenoj pri la tiamaj fusilmortigitoj.

La ĉeestantaro persiste rifuzis la filmon, kiu estis forpelita el la programo.

● Laŭ sciigoj el angla deveno, kiuj estis plene konfirmitaj, en Maroka urbo Tetuano pli ol mil militistoj komplotis kontraŭ Franko k aliaj faŝistaj estroj.

La komploto estis malkovrita per la germana servo de spionado; ĝi havas grandan amplekson, kelkajn branĉojn en la duoninsulo, k okazigis mortpunon al kelkaj centoj da arestitoj. Generalo Franko estis devigata rapide vojaĝi al Maroko por aranĝi la aferon.

Granda malkontenteco ekzistas en faŝista zono pro la gravo de fremdula invado.

● Meksikio sendis noton al Ligo de Nacioj pri hispana milito.

Ĝi, interalie diras: «Meksikio ne povas akcepti ke kiam oni petas al ĝi kunlaboron por solvi universalajn problemojn, oni intencas malgrandigi la porpacan agadon. Meksikio kredas ke neŭtraleco devas esti konsiderata laŭ la noblaj principoj de la Ligo, kiujn oni devas nepre apliki al hispana ribelo».

● Laŭ gazeto «National Zeitung» de Berno (Svisio) ekzistas en tiu urbo, informa servo faŝista, kiu telegrafe komunikas kun faŝistaj generaloj.

● Oficialaj sciigoj raportas, ke dum monato Marto, nia aviadilaro faligis 18 faŝistajn aeroplanojn k ni perdis 5 aviadilojn.

La nombro malaltiĝas nun iom ĉar faŝistaj aeroplanoj ne akceptas batalon kun la niaj. La faŝistoj nur flugas kiam niaj aviadistoj forestas, aŭ dum la nokto por bombardi civilajn urbojn....

● Pri du pliaj krimoj povas fieri la faŝista kulturo.

Unue, la bombardado al civila urbo Durango kiu estis la plej kruela el ĉiuj faritaj. Pluraj viktimoj tute senkulpaj....

Due, en Oviedo estis fusilmortigita la dekano de la Universitato, profesoro Leopoldo Alas, tutmonde konata; li estis murdita malgraŭ la petoj alvenintaj el la tuta mondo.

## DUOBLE PLI KOSTA

estas nun la afranko de nia gazeto por la gaja duonmonata vizito, kiun ĝi faras de nia redaktejo ĝis via hejmo. Ni volas hodiaŭ nude montri al vi unu solan noton el nia buĝeto, atentu: Ni bezonas ĝuste ĉiumonate jam, nur por afranki la poŝtan ekspedon de du numeroj, MIL pesetojn!

Tial vi devas, pli fervore ankoraŭ, kun obstina zorgo memori akurate pri niaj financaj adresoj, por ŝtopi diligente la duoblan truon.

GENERALA INTERNACIA ADRESO
nur por mono
GUSTAVE FARENC
55, Rue Brise-Pain
Poŝĉekkonto 13944 Orleans
ORLEANS (Loiret) FRANCIO

NEDERLANDA ADRESO
nur por mono de holandanoj
PETRO van der PLANK
Van Speijkstraat, 48-I.
poŝĝiro 245542
AMSTERDAM W. Nederlando

Angloj sendu la monon al K-do O. MELTON.—23 Fowler Str. Nechells
BIRMINGHAM 7 (Anglio)

REDAKCIA ADRESO POR ĈIO ALIA
**POPOLA FRONTO—Mar, 25, Valencia (Hispanio)**

## KELKAJ CIFEROJ

# Ideologia krozado

Sub la masko de ideologio, la faŝismo klopodas prezenti sin en kontraŭstaro al materia «bolŝevismo» kiu, laŭ Hitler k Mussolini celas detruon al mondcivilizo k al ĉiuj moralaj kvalitoj k spiritaj valoroj de la Homaro. Bombaste pretendas la rasismo k la faŝismo, esti la pioniroj de la minacata civilizo.

La sekvanta statistiko iom malkaŝas la «spiritan» enhavon de la ideologia krozado, al kiu la germana regnestro invitis ĉiujn ŝtatojn por alfronti la «ruĝan danĝeron». Jen do la parado de kelkaj ciferoj:

**Hispana minerala produktokvanto dum 1928-29 jaroj, kiuj estis de plej intensa produktado:**

| | |
|---|---|
| ZINKO | 139.000 tunoj |
| MANGANO | 80.000 » |
| KUPRO | 381.000 » |
| PIRITO | 1.600.000 » |
| FERO | 6.800.000 » |

**Minerala konsumado de Germanio en la jaro 1934 (la jaro de skandala rearmado):**

| | |
|---|---|
| ZINKO | 127.000 tunoj |
| MANGANO | 225.000 » |
| KUPRO | 325.000 » |
| PIRITO | 987.000 » |
| FERO | 8.264.000 » |

Post tiu klara alĝustiĝo de ciferoj estas evidente, ke la interveno de Germanio en nia milito konsistigas pruvon pri «ideologia krozado».

## NIA MUNICIO

| | | |
|---|---|---|
| Valencia esperantistaro | 36 | ptoj. |
| A. P.—Tour | 10 | ffr. |
| F. M.—Le Vesinet | 42 | » |
| R. J.—Novy Bohumin | 9'65 | » |
| J. W.—Mor. Ostrava | 14'81 | » |
| P. G.—Stranton West | 13'17 | » |
| J. H.—Montdevergues | 10 | » |
| E. S.-Svisa Esp. Instituto-Bern | 15 | » |
| R. F.—Brno-Kralovo | 37'04 | » |
| F. J.—Cambrai | 30 | » |
| V. M.—Liege | 10 86 | » |
| E. J. W.—Londono | 7'6 | ŝil. |
| X. X.—Sianliali | 55 | ffr. |
| F. L.—Ste. Mere Eglise | 7'50 | » |
| R. D.—Reicheenberg | 14 | » |
| Svenska Arbetar Esperantisten. - Stockholm | 115 | svkr. |
| R. S.—Letchworth | 6 | ŝil. |
| R. D.—Ostende | 14'59 | ffr. |
| J. L.—Helsinki | 51'50 | » |
| J. L.—Vitry Aux Loges | 50 | » |
| M. D.—Tallinn | 12 | » |
| M.—Evreux | 15 | » |
| T. J.—Surrey | 50 | » |
| L. W.—Orleans | 1 | » |
| Y. V.—Ginasservis | 5 | » |
| J. P.—Brno | 14'81 | » |
| M. B. Orleans | 25 | » |
| M.—Paris | 10 | » |
| P. G.—Issy les Moulineaux | 10 | » |
| N. K. Paris | 10 | » |
| R. J—Paris | 10 | » |
| M. L.—Liege | 15 74 | » |
| C. S.—Buenos Aires | 100 | » |
| L. P.—Amsterdam | 0 50 | gd. |
| Sekcio Heenvliet F. L. E. | 3 | » |
| Sekcio 15 Rotterdam F. L. E. | 1 70 | » |
| Sekcio Hoek van Holland F. L. E. | 2'50 | » |
| Sekcio Apeldoorn F. L. E. | 3'25 | » |
| Sekcio Heerlen F. L. E | 3 | » |
| D. B.—Huizum Fr. | 1 | » |
| J. S. Heerlen | 0'50 | » |
| H. K.—Groningen | 1 | » |
| M. H. v. d.—Knollendam | 1 | » |
| F. v. d. M.—Utrecht | 1'50 | gd. |
| Monkolekto ce F. L. E. - a Kongreso en Gent | 606'60 | bfr. |
| J. F.—Manresa | 2'50 | ptoj. |
| M. T.— » | 2'50 | » |
| J. B.— » | 2'50 | » |
| V. S.—Meksiko | 10 | » |
| I. A.—Londono | 3 | » |

Pro erara enpreso en pasintaj numeroj, ni kvitancas denove iliajn monsendojn al sekvantaj k-doj:

| | | |
|---|---|---|
| E. E. Y.—Aspremont | 3 | ptoj. |
| A. B.—Orleans | 15 | ffr. |
| E. Y.—Jellicoe | 5 | dol. |

## INFORMEJO

Ni sciigas, ke k-do Simon Weerdenburg, estis vidata lastfoje de k-do Hans Martens la 12-an Februaro. Ambaŭ kunbataladis en la sama fronto k en la sama taĉmento.

Laŭ nia informinto, lia valida adreso estas: S. R. I., Plaza Altozano, 52.-Albacete.

Kvankam kun iom da neevitebla prokrasto (pro la oftaj translokiĝoj) jam la koncerna poŝtservo regule funkcias. Lia patrino, do, atendu pacience se ŝi ankoraŭ ne ricevis, rekte de li, novaĵojn.

### ONI SCIVOLAS PRI

K-do Julien Crotteux, belga esperantisto, batalanto en Internacia Brigado.

K-do Artur Lehnert, ĉeĥoslovako, ankaŭ en Internacia Brigado.

## LASTA HORO

Nun estas la Biskaja provinco, en la baska regiono, kiu devas elteni la atakon de l'faŝismo ĵetanta avidajn rigardojn al la riĉa ĉefurbo Bilbao.

En la madrida fronto la situacio estas jam tre klara. En la sudo, la popola armeo en impeta ofensivo gajnas liberige terenon en abunda kvanto; dum du semajnoj oni rekonkeris pli ol 500 kv. kilometrojn.

Firme k serena oni gajnas la rajton ĝuadi la triumfon!

## POPOLFRONTA LETERUJO

E. M.-Los Llanos.-Ni sciigas vin, ke ni ricevis danke vian monsendaĵon. Notite ĉio!

A. D. P.-Voronej.-Alvenis la libroj de vi senditaj. Ni sendas al vi ekzempleron de P. F. por daŭre ricevi ĝin estonte, turnu vin al CK. SEU. Spiridonovka 15. Moskvo.

N. S.-Arkiva.-Ni akceptas vian saluton. Pri «Occidental» ni ne havas tempon diskuti. Ke ĝi estu pli facila ol ESPERANTO por la eŭropanoj (precipe por latindevenaj lingvanoj) ne estas avantaĝo sed baro por ĝenerala tutmonda akceptado, niaopinie. Nur ĝia nomo jam malfaciligas la akcepton flanke de orientanoj, ĉar ĝi ne estas neŭtrala nomo. Ni respektas vian entuziasmon, kvankam ni kredas, ke oni favoras pli taŭge la aferon de universala lingvo per subteno al konata, spertita k disvastigita ESPERANTO ol per propagando de novaj provoj. Vi ricevos la menditajn gazetojn.

J. B.-London.-Viaj gratuloj k aprobaj vortoj instigas nin al plua laborado. Dankon kamarado.

E. M.-Victoria.-Via sinteno pri unuiĝo ĝustas k ni ĝojas, ke vi aprobas la Popolfrontan vidpunkton. Rilate al la asertoj de iu episkopo de Seviljo, ni atentigas vin pri la monstraĵo, ke episkopoj tiaj benas la maŭrojn, kiuj perfortas virinojn de la hispana suferanta popolo k cindrigas la vilaĝojn. Juĝu vi mem pri la fido, kiun meritas tiuj abomenaj ekleziuloj, aliancanoj de Mahometo. La nomo de Kristo en ties lipoj estas blasfemo.

D. H.-Cerven.-Ni dankas pro via interesoplena letero, kies enhavon ni bone notis. Laŭeble ni kontentigos vin.

B. F.-Beka Topola.-Bonorde ni ricevis la respondkuponojn. Vi recevados regule nian bultenon.

H. M.-Sindi.-Bonvolu indiki al ni kien vi alsendis la monon k la du librojn, por ke ni prizorgu la alvenon de ili. Pro ĉio ni dankas vin.

E. G. B. Fuencarral.-La monsubteno al P. F. estas laŭpova k libervola.

S. D.-Alcaracejos.-Kutime la unuan paĝon verkas k-do L. H. k ankaŭ la artikoleto de vi aludita estas verko lia. Via letero alvenis siatempe.

B. T.-Edinburgh.-Ni ricevis vian leteron kun la enmetitaĵoj. Ĉion ni dece plenumas k skribos al vi.

S. P. C.-Vinaroz.-Ricevinte vian leteron, ni bone notas ĝian enhavon k gratulas vin.

L. K.-Paris.-Vi trafe alrigardas la aferon. Fakte, la preĝejoj estas utiligataj de la faŝistoj kiel fortikaĵoj k en la preĝejaj turoj nestiĝas la mitraliloj.

R. T.-Marseille.-Ni plenkonscie laŭtigas la voĉon de Popola Fronto. Tial nia gazeto ne subtenas apartan politikon de ajna partio aŭ organizo.

Demandintoj pri abonprezo.-Al ĉiuj ni ripetas, ke ne ekzistas tarifo por «P. F.» La monsubteno estas laŭvola k laŭpova. Por proksima estonto ni jam aranĝos tiun aferon laŭ maniero ke la abono estu ebla eĉ por senlaborulo. Nia bulteno devas esti malkara k bela gazeto por la esperantista amaso. Ni havas grandajn esperojn...

Presejo de J. Olmos, Alicante, 33, Valencia